

MODIFPROpono DE ILEI: FINANCA DISPONIGO por EDUKAJ LABOROJ en 2013

La nuna buĝetpropono de UEA por 2013 entenas sumon de €6000 por la edukaj laboroj sub rubriko VIII Movada Evoluigo. La sumo por informado estas €10000 kaj por Movada Evoluigo entute €19800. Kiel ni konstatis, ILEI ne rajtas supozi, ke ĝi disponos je la tuta eduka sumo, ĉar UEA havas la proprajn planojn kaj devojn. En 2012 el la buĝetitaj €6000, ILEI disponis je €4200, el kiu €1200 estis certigita nur en aprilo 2012, kiu malfruas por permesi realigon de projektoj.

Por 2013, ni proponas, ke la porcio kiun ILEI disponu estu jam en julio 2012 konebla, kaj estu determinebla surbaze de konkretaj detaligoj, nun prezentataj. Ĉefaj trajtoj de la peto estas jenaj:

- Prepari la vojon por la novaj planoj kaj strukturoj atendataj el la Strategia Vizio de UEA, kaj la Strategia Plano kiu naskiĝos el ĝi.
- Proksimigi la sumojn je dispono por informado kaj edukado, por mildigi la impreson, ke informado valoras kaj meritas 40% pli ol la edukado kaj instruado.
- Subteni ne nur kursojn kaj planojn en foraj kontinentoj, sed pli forte stimuli kaj kunordigi la instruistan trejnadon, kaj stabiligi la internan funkciadon de ILEI – membro-administrado, mult-lingva retejo, kaj la orda transigo de la financa administrado al nova prizorganto.
- Permesi al ILEI refunkciigi projektojn, kiujn ĝi en 2012 devis abandoni por redukti sian propran buĝetan deficiton de pli ol €8000 ĝis €4000.
- Permesi al ILEI eviti similskalan deficitan buĝetadon en 2013 (la kvara sinsekva jaro en kiu tio estis devigata – la ILEI-membrokotizo devas modesti kaj sufiĉas nur por liveri servojn al la membroj, ne por financi mondvastan instru-programojn).

N-ro	Projekto	Bezono	Propono
1 #	Afrika agado (4 projektoj/aranĝoj)	€2000	€500
2	Postsekvo de la atingoj el Ĉinio, Vjetnamio kaj Azio	€2000	€500
3	Instruista trejnado en fizikaj kursoj kaj seminarioj	€2000	€500
4 #	Instruista trejnado tra la reto (stipendioj por RITE)	€1600	€500
5 #	Daŭrigo de stipendioj por kursanoj ĉe la 3-jara kurso en UAM	€1000	€500
6	Starigo de komuna kadro por trejnado, oficialigebla ĉe ALTE.	€1000	€500
7	Progresigo de la multlingva eduka retejo kiun prizorgas ILEI *	€2000	€700
8	Aperigo de serio de decaj dulingvaj varbiloj pri Eo kaj ILEI *	8 lingvo-paroj €1000	4 versioj €600
9	Starigo de minimuma programo de eksteraj rilatoj *	€2000	€400
10 #	Progresigo de kurso 125 kaj ĝia fervojista ekvivalento	€40.000	€700
11	Stabiligo de la financa kaj membra administrado en ILEI *	€3000	€500
12	Restarigo de la eldona programo ĉe ILEI *	€1000	€400
	Sumo rezervita por la bezonoj de UEA	€2000	€1800
SUME		€ 58.600	€ 8.000

La nuna propono levos la suman disponigon por edukado de €6000 ĝis €8000. La komitato kaj estraro rajtas elpensi proprajn manierojn reekvilibrigi la buĝeton, sed ILEI povas proponi fiksi la disponigon por Informado je €9000, por ke Informado kaj Edukado malpli diverĝu, kaj preni la restantan €1000 el ceteraj kostoj aŭ enspezoj – pri la specifaj eroj decidu tiuj, kiuj havas sufiĉajn internajn informojn por fari saĝajn decidojn tiurilate.

Perspektive, ILEI preferus, ke la sumoj por Movada Evoluigo entute kresku kiel proporcio de la sumaj spezoj de la Asocio, atingebla per modernigo kaj efikigo de la manieroj uzataj por liveri servojn al la membroj. Por doni perspektivon al tiu deziro:

La Eduka Disponigo:

€6000 kompare al la jara spezara sumo de €509.430:	1.18%	do iom pli ol centono.
€6000 kompare kun la suma Asocia Kapitalo de 5.791.513:	0.103%	ĉ. unu milono.

La Disponigo por Movada Evoluigo entute (Informado, instruado, eksteraj rilatoj...)

€19800 kompare al la jara spezara sumo de €509.430:	3.88%	
€19800 kompare kun la suma Asocia Kapitalo de €5.791.513:	0.34%	triono de unu procento.

Notoj pri la detalaj proponoj por la eduka programo de UEA/ILEI en 2013:

ILEI antaŭvideble suplementos tiujn sumojn el la propra buĝeto, kio okazis en 2012.

* Agadoj de ILEI nuligitaj aŭ severe tranĉitaj en 2012 pro rimedomanko.

1. Afrika agado. €300 malpli ol disponigita de UEA en 2012
2. Ni staras antaŭ potenciala eksplodo de eblecoj en Azio.
3. ILEI en julio 2012 starigas tian du-semajnan kurson, kiu meritas daŭrigon en 2013.
4. RITE: sama sumo de UEA kiel en 2012.
5. UAM, sama sumo de UEA kiel en 2012.
6. Nova grava iniciato; vidu IPR 2012/2 kaj dokumenton pretigitan por ALTE.
7. Tra pli ol jaro ekzistas, sed eterne sub konstruo pro manko de rimedoj.
8. Tiuj ege bezonatintus por la monda kongreso de FILPV en Finnlando en majo 2012. Malneta skizo ekzistas, manko de rimedoj malebligas finpoluron, tradukadon kaj presadon.
9. Tio urĝe bezonas apartan prizorganton kaj ampleksan planon. Nuntempe ILEI rilatas nur kun FIPLV kaj malrekte kun ALTE: deko da simile meritaj organizoj troveblus ene de dek minutoj.
10. La ploriga manko de rimedoj ĉe ILEI kondamnis tiujn kursojn al abandono kaj stagno. La jubileo tamen liveru ian utilon – per ilia finpretigo. Neniu serioza eduk-liveranto (E@I, edukado_net) eĉ konsiderus tian projekton sen unue certigi almenaŭ investokaptialon de €40.000. Nur la naiva ILEI provis senrimede lanĉi kaj labori pri la projekto.
11. Stabiligo de la membroadministrado esencas al la bezonata (kaj meritata) kresko en la membronombro, samtempe bezonata por sanigi la ligajn financojn. La bezono transigi la financon prizorgon al novaj manoj levas bezonojn ankaŭ tiukampe.
12. Por limigi la deficiton en 2012, ILEI plene fermis sian malrevuan eldonan agadon (inkluzive eĉ de varbiloj), kiam kontraste la Strategia Vizio antaŭvidas ampleksan kaj intensan eldonadon de lerniloj kaj priedukaj verkoj.

Aliaj tranĉoj faritaj de ILEI en 2012: Unu estrarkunsido estis nuligita, praktike la tuta ekstera agado kiu portus kostojn same, ni serioze konsideris forigi koloran preson de la kovriloj de IPR kaj *Juna amiko*, kies honorarioj estis duonigitaj. La buĝeto 2011 de ILEI antaŭvidis deficiton de €4120, kaj tiu de 2012 de €4380 (tio estas ĉ. 6% de la liga kapitalo.) UEA kontraste ne kuraĝas proponi deficitajn buĝetojn entute. ILEI ne havas alian eblon – krom fermi la pordon kaj rezigni entute pri eduka agado – kio praktike signifus – ĉesi labori por plenumi siajn celojn. La du menciitaj deficitoj de ILEI, se okazintus egalmezure ĉe UEA, rezultus en estrara propono al la komitato pri jaraj deficitoj de €338.000 kaj €360.000 respektive. Klare neniu estraro de UEA pretervivus tian proponon.

La propono: UEA en 2013 buĝetu disponigon de €8000 por la edukaj laboroj.